ESPERANTO

sub la suda kruco ★





kie okazis la unua kongreso de AEA en 1911 kaj la UK de 1997.

9 - 17 julio 2011

Jubilea kongresejo:

Universitato de Adelajdo

aea2011kongreso.ning.com

Esperanto Aŭstralio★

100 JAROJ
1911 - 2011

oficiala organo de la aŭstralia kaj nov-zelanda esperanto-asocioj
volumo 19 [2] • numero 106 • junio 2011
ISSN 1038-9380



ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO ASOCIOJ

volumo 19 [2] • numero 106 • junio 2011

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio

Redaktoroj | Chris Krägeloh & Ŝandor Monostori
Kontaktadreso | **esk2@esperanto.org.au**

P.O. Box 1097

Bendigo Central, Vic 3552, Australia

Abonoj & Pasintaj Numeroj

Esperanto Sub La Suda Kruco estas aŭtomate sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEA).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA | www.esperanto.org.au – info@esperanto.org.au
NZEA | www.esperanto.org.nz – exec@esperanto.org.nz

Kiel kontribui al *ESK*

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunktoj, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia oficiala kontaktadreso, "esk2@esperanto.org.au".
Limdato por kontribuoj por la sekva numero:

15a de aŭgusto 2011

La redaktoro rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

Por la opinioj aperantaj en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne necese spegulas la opiniojn aŭ de AEA, aŭ de NZEA.

Copyright @ 2011, AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj.


4 **La Unua**


9 *Hugo Leschen*


11 *Pri la Aĉeto de* **Esperanto House** *en Sidnejo*

12 **Esperanto League of Western Australia (Inc.)**

13 Esperanto-Ligo de Okcidenta Aŭstralio (korp.)


14 Visit of Two Members of *Kajto*

15 Vizito de Du Membroj de *Kajto*

18 Monvarba Kampanjo por Esperanto-biblioteko en Afriko

La Unua

de Katja Steele



La jubilea kongreso alproksimiĝas. Baldaŭ ni kunvenos por festi la 100an datrevenon de la unua Esperanto-kongreso sur aŭstralia teritorio, okazinta en Adelajdo la 26an ĝis kaj 28an de oktobro 1911.

Ĉe naskiĝtagfestoj, precipe ĉe tiuj pli grandciferaj, ni volonte refreŝigadas la malnovajn memoraĵojn, revokas la grandajn momentojn de nia vivo, trarigardas la eble jam flaviĝintajn fotojn. Faru ni same pri nia festanto, la aŭstralia Esperanto-movado. En julio ni havos je nia dispono kelkajn tagojn, sed por apetitigi vin jen kelkaj elektitaj unuaj paŝoj de nia jubileulo, kolektitaj plejparte el la malnovaj aŭstraliaj E-revuoj.

La unua Esperanto-klubo en Aŭstralio estis la Esperanta Klubo Melburna en 25 Rathdown Street, Carlton – la hejmo de John Booth. La fondkunveno okazis la 10an de februaro 1905. J. Booth, eminenta inĝeniero kaj membro de la konsilantaro de la Melburna Universitato, estis elektita kiel prezidanto. Aligitaj estis 79 homoj kaj la kunvenoj okazadis ĉiusemajne. En januaro de 1972 estis sur la iama domo de J. Booth inaŭgurita memortabulo honore al li kaj al **la unua Esperanto-societo en Aŭstralio**.



Dekstre: John Booth

Arthur Maurice Hyde (1891-1965) aliĝis al Esperanta Klubo Melburna en 1907. En 1918 li verkis **la unuan aŭstralian studlibron** *Kurso en Esperanto*. Li estis **la unua redaktoro** (1920-1921) de *La Suda Kruco*.

En la sama jaro kiel A.M. Hyde ankaŭ George Gordon (1857-1946) aliĝis al la melburna E-klubo. Esperanton li lernis en 1906, kaj al la movadoj en Nov-Zelando kaj Aŭstralio li kontribuis dum 40 jaroj. Li starigis **la unuan korespondan stud-grupon** (1908). G. Gordon iĝis vaste konata kiel verkisto (pseŭdonime Gego). Lia irlanda familio migris al Nov-Zelando en 1858. Konataj estas liaj verkoj: *Kara Panjo* (1911), *La kamena angulo* (1913), *Alegorioj el la naturo* (1913 kaj 1922), *Lia lasta ŝanco* (1915).

La Aŭstralia Esperanto-Asocio aliĝis al UEA en 1942. **La unua komitatano** de UEA en Aŭstralio estis (de 1960) Kenneth G. Linton (1906-1985). Dum 30 jaroj (ekde 1955) li estis ankaŭ ĉefdelegito kaj peranto de UEA en Aŭstralio kaj prezidanto de AEA (1952-1956, 1968). K.G. Linton verkis multajn artikolojn por *The Australian Esperantist* kaj tradukis en Esperanton la romanon de Nevil Shute (*Sur la bordo*). Lia romano *Kanako el Kananam* (1960) estis reeldonita en 2004 dulingve, kun anglalingva traduko.

Edith Alleyne Sinnotte (1870-1947) estis britdevena aŭstralianino. Ŝi estis **la unua virina novelisto en Esperanto**, verkinta la romanon *Lilio*, kiu estis samtempe **la unua originala Esperanto-romano verkita en Aŭstralio** (1918).



La 14a E-kongreso, Melburno, 30.12.1963 ĝis 5.1.64. Estraro: (de maldekstre): I.T. Maddern (vic-prezidanto), M. Kenzie (membro), J. Matasin (membro), K.G. Linton (kasisto), M. Leereveld (vic-prezidanto), H. Koppel (sekretario), D-ro Ross Robbins (prezidanto).

La unua aŭstralia E-revuo estis *The Australian Esperantist*. Ĝia unua numero aperis en majo 1908 en *Benalla*, Viktorio. La redaktoro estis D-ro A.E. Barrington (1862-1919). Je lia memoro en tombejo ĉe *Benalla* estis starigita la 12an de septembro 1976 speciala tomboŝtono, plejparte dank' al iniciatemo de Ivan Maddern kaj la Historia Societo de Benalla. Rezulte la urba konsilantaro de Benalla decidis nomi du novajn stratojn *Barrington* kaj *Esperanto*.

En ĝia dua (junia) numero skribiĝas: "Malgraŭ la iom malvarmeta akcepto de nia malferma numero ni decidis daŭrigi la aferon ankoraŭ kelkatempe..."

La 3a numero sciigas: "Ni ĝojas anonci, ke la junian numeron de nia ĵurnalo oni akceptis multe pli varme, ol la majan."

En la aŭgusta eldono la redaktoro citas el la letero de L.L. Zamenhof: "Kara sinjoro, la unuan numeron de 'The Australian Esperantist' mi ricevis kun plezuro kaj danko. Mi esperas, ke la gazeto multe servos al la disvastigado de nia afero en via lando."



THE

Australian Esperantist.

A Monthly Journal Devoted to the Interests of Esperanto.

Registered at the General Post-Office, Melbourne, for transmission as a Newspaper.

VOL. 1. N-RO. 10. FEBRUARO, 1909. PREZO 3 PENCOJ.

ALVOKO AL NIA LEGANTOJ.

La unua jaro en la vivo de nova gazeto estas ĉiam kriza, kaj precipe kiam ĝi celas la propagandon de ia nova ideo. La antaŭtimoj kiujn ni sentis komencante ĉi tiun gazeton estas pli ol rajtigitaj. Ni jam konstatis ke el la malmulte da esperantistoj aŭstraliaj, ankoraŭ malplimulte sufiĉe interesas sin por helpi al la sola organo esperanta en la kontinento. Do, ankoraŭ unu fojon plu ni insiste alvokas al niaj

AN APPEAL TO OUR READERS.

The first year in the life of a new gazette is always critical, and especially when it aims at the propaganda of any new idea. The apprehensions which we felt in commencing this gazette have been more than justified. We have found that out of the few Australian Esperantists, still fewer interest themselves sufficiently to contribute to the sole Esperanto organ in the Continent. Once more, then, we

D-ro Samuel McBurney (1847-1909) estis doktoro en la fako de muziko. Naskiĝinta en Skotlando li studis ĉe la universitato de Glasgow. Dumtempe li vivis en Aŭstralio, sed en 1876 li reiris al Britujo kaj interesiĝis pri la tonik-solfaa metodo en instruado de muziko. Reveninte al Aŭstralio en 1877 li estis la unua muzikisto, kiu enkondukis tiun metodon en la lando, lerninte ĝin de la inventisto John Curwen. De 1906 li membris en la melburna E-klubo kaj estis ĝia vicprezidanto en 1908. Por la E-mondo li komponis la melodion kaj verkis la vortojn de kanto Kie estas nia lando?, kiu estis kantata dum **la unua aŭstralia E-kongreso** en Adelajdo en 1911.

La muzik-reĝisoro de la jubilea kongreso de 2011, Alan Bishop, enmetis Kie estas nia lando? ankaŭ en la liston de ĉi-jaraj kongresaj kantoj.








DELEGATES TO FIRST AUSTRALIAN CONGRESS, HELD IN ADELAIDE.

Back Row—Dr. Lowe, Mr. A. H. Johnson, Mrs. Young, Mrs. M. D. Harrison, Miss Holden, Messrs. Bowles, W. J. Drummond, Paris Nesbit, K.C., H. W. Uffindell, M. Hyde, A. L. ...n, W. Hogg, J. Lyall, W. D. Edmanson, Geo. Collingridge, and J. Bowman. Third Row—Messrs. F. E. Place, D. Smith, Misses Robinson, Ely, Wilson, Mr. J. G. Pike, Miss Ely, ...rost, Mrs. Prost, Mr. C. W. Ballard, Mrs. Shepherd, Nurse Shephard, Rev. J. Lumsden, Mr. J. Skerrie, Mrs. Lellmann, and Dr. A. E. Shepherd. Second Row—Mrs. A. H. Johnson, Misses Travis, ...son, Van Maleky, Hume, Major Leschen, Dr. Kendall, Mrs. Parker, Mrs. W. Hogg, Miss Thomas, Mrs. Davies, Messrs. H. H. Linz, B.A., C. ...A. Uhrlich, Lellmann, and Mrs. Lumsden. Row—Misses Davies, Hillmann, H. Stewart, and Edmanson. Krischock, photo.

La unua somerlernejo de AEA okazis en *Toowoomba* en januaro 1977. S-ino Jean Lehane, la prezidanto de Toowoomba Esperanto-Societo, iniciatis 10-tagajn E-kursojn en la kadro de *Darling Downs Institute of Advanced Education* (instituto de altgrada edukado en Toowoomba). La loĝ- kaj stud-ĉambroj estis ĉe la kolegio *Fairholme*. La klason por komencantoj instruis Wre Chandler per *Privilegia vojo al lingvoscio*, la mezgradulojn Ray Ross per *Paŝoj al plena posedo* kaj la triagrupanojn Trevor Steele per *Kiel akvo de l'rivero* kaj *Humoroj*.



Dekstre: Wre Chandler

Hugo Leschen
– kiu prezidis la unuan kongreson


de Charles Stevenson

La Esperanto-movado gajnis frue en Sudaŭstralio elstaran subtenanton. Tiu estis s-ro Hugo Leschen. Oni dubas, ĉu ekzistis pli konata persono en Adelajdo. Viro senlime energia, Leschen forte engaĝiĝis por sociaj aferoj. Li plenumis multe dum la 58 jaroj de sia vivo, malgraŭ kelkfoja korpa kolapso.

Ĉefe per gimnastiko li influis la socion de tiu tempo. Li heredis la gimnastikejon en Pirie strato, kiu apartenis al lia patro, sed pli grava estis la instruado de korpa trejnado al

mil geknaboj, precipe en la gimnazioj de *St Peters* kaj *Prince Alfred*, sed ankaŭ en altlernejoj de la eduka fako. Li aktivis ankaŭ pri la skolta movado kaj *YMCA* kaj *YWCA*, respektive la ascoioj por junaj kristanaj viroj kaj virinoj.

Ŝajne li ĉiam ĉeestis jarkunvenojn, speciale infanajn spektaklojn, kie lia genio manifestiĝis en prezentaĵoj de korpaj ekzercoj, halterumado, dancado, kaj skermado. La karitataj organizoj, kiujn li subtenis, estis la asocio por blinduloj, la misio por maristoj, la asocio por malhelpi kruelecon al bestoj, kaj li helpis aranĝi ekspozicion pri la laboro de virinoj. Estis ankoraŭ alia intereso lia: masaĝo. Tion li estis studinta en Dresdeno. Dum tri jaroj li laboris en la Adelajda Hospitalo, kaj li fondis la Aŭstralian Masaĝo-Asocion.



Supre: Hugo Leschen

La Esperanta movado ne estis politika kaj ne malebligis membrojn pro ideologio. Tial, membroj estis kaj militistoj kaj pacifistoj. En Sud-Aŭstralio ne estis nur Leschen, sed ankaŭ subkolonelo David Fulton, ano de Anzac (partopreninto en la militoperacio Anzac), kaj dum pluraj jaroj prezidanto de la Esperanto-movado en Sud-Aŭstralio. Leschen fervore apogis soldatajn virtojn. Dum la jaroj de la milito kontraŭ la sudafrikaj buroj li starigis kadetan korpuson. Post la landodefenda leĝo de 1909, laŭ kiu ĉiuj junuloj aĝaj de 14 ĝis 17 devige faris milittrejniĝon, Leschen iĝis batalionestro, samranga kun armea majoro.

La Esperanto-movado neniel gajnintus tiel multe sen la laboro de Leschen. Kvankam li kore akceptis Esperanton, ne estas strange, ke li ne multe progresis en la lernado, ĉar li havis tro da devoj. Unu el la ĉefaj propagandistoj de la Esperanto-lingvo, Carl Urhlaub, estis bona amiko de Leschen. Urhlaub parolis pri la historia rolo de Leschen dum la unua Aŭstralia Esperanto-kongreso:

“Tuj kiam majoro Leschen sciiĝis pri nia deziro, kaj decidis klopodi en nia nomo, la semo ekvivis, kvazaŭ magiisto svingus sorĉbastonon. En la vortaro de majoro Leschen ne ekzistas la vorto ‘malsukceso’ … Estas entute ŝuldate al li, ke nia kongreso ricevis la publikan agnoskon de ĉefaj civitanoj de Adelajdo … Estis li, per sia entuziasmo taktoplena, kiu sukcese vekis intereson en la profesoroj de nia universitato kaj aliaj bone konataj edukistoj pri tiu granda diskuto [pri internacia lingvo].”

La kongreso de 1911 estis grandega okazaĵo. Estis multe da reklamado en la ĵurnaloj. Ĉi ĉio okazis sendube pro la elano kaj la kontaktoj de majoro Hugo Leschen.★

Pri la Aĉeto de *Esperanto House* en Sidnejo



de Kam Lee

Esperanto House estas du-etaĝa, brika konstruaĵo en *Redfern*, Sidnejo, kaj ĝi estas proksimume 200 m for de *Redfern* trajnstacidomo. Mi unue pensis, ke *Esperanto House* en Sidnejo estis aĉetita, aŭ per la financoj de riĉa bonfarinto aŭ rekte per mono el la bankkonto de la Esperanta Federacio de Novsudkimrujo.

Fakte pro la penoj de John Matasin, la aĉeto de *Esperanto House* en Sidnejo okazis per la spekulado de proksimume 4 436 "*Esperanto House*" akcioj, kiuj estis sukcese venditaj ĉefe al esperantistoj po $10. La akirita mono estis uzata por la aĉeto de proprietaĵo ĉe *Redfern* en 1960. La aĉetita posedaĵo konsistas de domo apud la strato kaj granda ŝedo en la malantaŭo.

La malantaŭa konstruaĵo (kiu nuntempe estas pentrejo) estas farita de galvanizitaj feraj tavoloj kaj estas uzata kiel fabriko. La luadmono de la fabriko estis donata al la bankkonto de Esperanta Federacio de Novsudkimrujo. Finfine dum decembro 1968 la Novsudkimruja Federacio reaĉetis ĉiujn venditajn akciojn. Unu el la akcio-posedantoj de *Esperanto House* estis Roger Springer. Li fieris esti partposedanto de *Esperanto House*, kaj li iomete malfeliĉiĝis post kiam la Novsudkimruja Federacio reaĉetis lian akcion.

En novembro 2011 okazis speciala vespera kunsido ĉe *Esperanto House*, kie la novsudkimrujaj gastigantoj bonvenigis esperantistojn el Sudaŭstralio, Kvinslando, Viktorio kaj Tasmanio. Antaŭkunsidaj agadoj inkluzivis ĝeneralan babiladon kaj manĝadon de pico aŭ biskvitoj kaj trinkadon de teo aŭ kafo. La kunsido komenciĝis per kelkaj amikaj komentoj kaj enkondukoj parolitaj de reprezentanoj el la diversaj ŝtatoj.

Dum la vespero, kelkaj esperantistoj parolis, per la uzo de projekciilo kaj portebla komputilo. Ŝandor Horvath parolis pri la venonta jubilea Esperanto-Kongreso en Adelajdo. Interesajn paroladojn prezentis Margarette Chaldecott, Dianne Lukes, Roger Springer kaj Max Wearing.★

2000-2011: Esperanto League of Western Australia (Inc.)

by Trish O'Connor

Since 2000 the Esperanto League of Western Australia (ELWA) has been working on two-year plans, which encourage them to look into the future and learn from the past. Most goals have been achievable with the support of committee members. Other goals can be achieved with more time and more help from members.

It is not easy to attract new members. Free notices in local community newspapers catch the eye of a few curious readers who want to find out more about Esperanto. When their curiosity is satisfied they may decide to join ELWA and learn the language, by correspondence or at monthly practise sessions. Some learners prefer learning in formal groups and from time to time TAFE have been willing to include Esperanto in their course programs. Unfortunately, the low number of enrolments deems the courses unviable.

ELWA always supports its members in learning the language and long-time member Shirley Gradussov enthusiastically leads regular monthly sessions, with an interesting range of topics. Together, the group work their way through courses, articles, stories and the occasional correspondence from overseas Esperantists. An international highlight was a picnic lunch at Kings Park followed by a walking tour of Perth, which ELWA hosted for a group of Polish visitors. We would like to see Esperanto developed more through tourism, and a long-term goal to develop an accredited course for adults is in the pipeline.

From a younger perspective, ELWA has supported a number Montessori schools and their teachers, namely Penny Vos, Saani Bennetts, Merradean Pettit (Treetops), Sheryl Ridout and Trish O'Connor (Perth). Major Montessori projects included a teacher/student/parent group visit to Switzerland, hosted and organised by Saani Bennetts and, a number of scholarships for Montessori students to attend Australian Esperanto Summer Schools. Apart from Montessori, Trish O'Connor was also given the opportunity to introduce Esperanto to gifted art and language primary students and later produced a video course for TAFE television. Language guidance for these projects was generously provided by Shirley Gradussov, Debra McCarney, John Harvey (d.), Alan Mendelawitz, Vera Payne and Rene Smeets (d.).

The 2002 Australian Esperanto Summer School was held in Perth, despite international turmoil in 2001. The event was officially opened by Patron, Peter Natrass, City of Perth Lord Mayor and attracted a number of major sponsors. A detailed Final Report (including a visitor survey) was supplied to AEA.

The 2002 summer school led to a major ELWA project, translating a complete range of classroom resources, professionally produced by local publisher LOTE Teaching Aids. Hopefully these bright and colourful resources will be put to good use in the future.★

2000-2011: Esperanto-Ligo de Okcidenta Aŭstralio (korp.)



Esperantigita de Vera Payne

Ekde 2000 Esperanto-Ligo de Okcidenta Aŭstralio (ELOA) funkcias je du-jara plano, kiu instigas anticipi la estontecon kaj informiĝi de la pasinteco. La plimulto de la celoj jam atingeblis, dank' al la subteno de la komitatanoj. Aliaj celoj povos esti efektivigitaj kun pli da tempo kaj helpo de la anoj.

Ne estas facile allogi novajn anojn. Senpagaj anoncoj en lokaj komunumaj ĵurnaloj kaptas la atenton de kelkaj scivolemaj legantoj, kiuj volas eltrovi iom pri Esperanto. Kiam ilia scivolemo estas plenumita, ili eble decidos aliĝi al ELOA kaj lerni la lingvon per korespondaj kursoj aŭ ĉe ĉiumonataj ekzerc-sesioj. Kelkaj lernantoj preferas lerni en formalaj grupoj kaj fojfoje TAFE konsentis inkludi Esperanton en sia kursaro. Domaĝe, la malgranda nombro da registrantoj rezultis en ne vivpovaj kursoj.

ELOA ĉiam strebas helpi siajn anojn lerni la lingvon kaj longatempa ano Shirley Gradussov entuziasme kondukas regulajn monatajn sesiojn, kun interesa serio da temoj. Kune, la grupo tralaboras kursojn, artikolojn, rakontojn kaj la fojfojan korespondadon de eksterlandaj esperantistoj. Internacia allogaĵo estis pikniklunĉo en *King's Park* kaj sekva piediro, kiujn gastigis ELOA por grupo da vizitantoj el Pollando. Ni ŝatus vidi Esperanton disvolvigita pli tra la mekanismo de turismo, kaj nia celo evoluigi akredititan kurson por plenkreskuloj estas jam komencita.

Koncerne la etuloj kaj junuloj, ELOA subtenis kelkajn *Montessori*-lernejojn kaj iliajn instruistojn, nome Penny Vos, Saani Bennetts, Merradean Pettit (*Treetops*), Sheryl Ridout kaj Trish O'Connor (*Perth*). Gravaj *Montessori*-projektoj inkluzivis instruisto/lernantoj/gepatroj-grupan viziton al Svislando, gastigita kaj organizita de Saani Bennetts, kaj kelkajn stipendiojn por helpi *Montessori*-gelernantoj partopreni en somerkursaroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio. Krom *Montessori*, Trish O'Connor ankaŭ profitis la oportunon enkonduki Esperanton al en arto kaj lingvo talentaj elementalernejanoj, kaj poste produktis video-kurson por TAFE-televido. Lingva helpo por tiuj projektoj malavare donis Shirley Gradussov, Debra McCarney, John Harvey (forpasinta), Alan Mendelawitz, Vera Payne kaj Rene Smeets (forpasinta).

La Aŭstralia Esperanto-Asocio Somerkursaro estis okazigita en Perto en 2002, spite al internacia tumulto en 2001, kaj estis oficiale inaŭgurita de la Patrono, Peter Natrass, la Urbestro de Perto, kaj allogis nombron da sponsoroj. Detaloplena Fina Raporto (inkluzive de vizitant-opiniaro) estis liverita al AEA.

La 2002 Somerkursaro kondukis al grava ELOA projekto, traduki kompletan serion da klasĉambro-rimedoj profesie produktitaj de loka eldonejo LOTE Teaching Aids. Espereble, ĉi tiuj belaj kaj buntaj rimedoj estos bone utiligitaj en la estonteco.★

Visit of Two Members of *Kajto*

by Kam Lee

The most significant musical event in the Australian Esperanto 2010 calendar was the visit of Ankie van der Meer and Nanne Kalma, who are two members of the famous Esperanto group *Kajto*. Ankie van der Meer is a female singer, who also plays the guitar and banjo. Nanne is a male singer, who plays the guitar, mandoline, harmonica and violin. He is the chief writer of the lyrics.

During mid December, they presented concerts in a private house in Adelaide, at Federation Square in Melbourne and at Esperanto House in Sydney. Their style of music is essentially folk, and they sing in Esperanto and many other languages. Some of the songs, which were originally written in Esperanto, were later translated into other languages.

The Adelaide concert occurred in the house of the Thortons, who are Australian musicians and often meet Ankie and Nanne at international concerts. The songs were sung in the Frisian (their first language), Dutch, English and last, but not least, the Esperanto language. A third of the audience were Esperantists, and occasionally Ankie and Nanne encouraged the audience to join in singing in Esperanto. One of the songs was dedicated by Ankie to Katja Steele, and it was about a beautiful rose, which successfully made a man fall in love with it, who then bought it and took it home.

The Melbourne concert occurred at Federation Square, which is located in the city centre. The two singers happily sang songs for an hour on the stage in Esperanto and other languages. At the front of the stage hung Esperanto banners, which were clearly seen by the general public. Afterwards, there was lunch and lively conversation with Esperantists.

Esperanto House was the Sydney venue, and many Esperantists attended. The interviewer, Rainer Kurz, introduced the two members of *Kajto* and he asked the two questions. The first question was about how the group was formed. Ankie replied that her first contact with Esperanto occurred while she was learning the French language in secondary school. She noticed, that the teacher spoke and taught Esperanto during the break. Another significant event was when she was at a concert in Hungary. It was the first experience in a country, where Dutch, French, Frisian, German and English were not spoken. Later, she came across some poems from Nanne and started to collaborate with him, and the group *Kajto* was formed.

The second question was about how the group *Kajto* became named. Nanne replied, that when he was about ten years old, he flew kites, which were self-made and made out of paper. Another inspiring moment occurred in his Dutch city airport.When looking at wind socks, he asked his mother about their function. She replied that they were used to show the wind direction, and thus the direction of the arrival and departure of the planes could be coordinated.

Vizito de Du Membroj de *Kajto*

de Kam Lee

La plej signifa muzika evento en la aŭstralia Esperanta kalendaro de 2010 estis la vizito de Ankie van der Meer kaj Nanne Kalma, kiuj estas du membroj de la fama Esperanta grupo *Kajto*. Ankie van der Meer estas kantistino, kiu ankaŭ ludas la gitaron kaj banĝon. Nanne estas kantisto, kiu ludas la gitaron, mandolinon, harmonikon kaj violonon. Li estas la ĉefverkisto de la lirikoj.

Mezdecembron en 2010 ili prezentis koncertojn en privata domo en Adelajdo, Federacia Placo en Melburno, kaj *Esperanto House* en Sidnejo. La stilo de ilia muziko estas esence folklora, kaj ili povas kanti en Esperanto kaj multaj aliaj lingvoj. Kelkaj el la kantoj estis originale verkitaj en Esperanto, kaj poste estis tradukitaj en aliaj lingvoj.

La adelajda koncerto okazis en la domo de gesinjoroj Thorton, kiuj estas aŭstraliaj muzikistoj kaj ofte renkontis Ankie kaj Nanne dum internaciaj koncertoj. La kantoj estis kantitaj en la frisa (ilia unua lingvo), nederlanda, angla, kaj, lasta sed ne la plej malsignifa, Esperanta lingvo. Triono de la aŭdantaro estis esperantistoj, kaj kelkfoje Ankie kaj Nanne instigis la aŭskultantojn kanti Esperante kun ili. Unu el la kantoj estis dediĉita de Ankie al Katja Steele, kaj ĝi temas pri bela rozo, kiu sukcese kaptis la koron de la amata viro, kiu poste aĉetis kaj portis ĝin hejmen.

La melburna koncerto okazis sur Federacia Placo, kiu situas en la urbocentro. La du kantistoj feliĉe kantis kantojn dum unu horo sur la scenejo en la Esperanta kaj aliaj lingvoj. Ĉe la antaŭo de la scenejo pendis Esperantaj standardoj, kiuj estis klare viditaj de la ĝenerala publiko. Poste okazis tagmanĝo kaj vigla konversacio kun esperantistoj.

Esperanto House estis la muzikloko en Sidnejo, kaj multaj esperantistoj ĉeestis. La intervjuisto, Rainer Kurz, enkondukis la du membrojn de *Kajto*, kaj li faris du demandojn. La unua demando estis pri kiel la grupo fondiĝis. Ankie respondis, ke ŝia kontakto al Esperanto okazis dum ŝi lernis la francan lingvon en mezlernejo. Ŝi rimarkis, ke la instruisto parolis kaj instruis Esperanton dum la paŭzo. Alia signifa momento okazis dum ŝi ĉeestis koncerton en Hungario. Estis ŝia unua sperto kun lando, kie la nederlanda, franca, frisa, germana aŭ angla lingvoj ne estis parolataj. Poste ŝi trovis poemojn de Nanne kaj decidis kunlabori kun li, kaj la grupo *Kajto* naskiĝis.

La dua demando estas pri kiel la grupo *Kajto* eknomiĝis. Nanne respondis, ke dum li estis proksimume dekjaraĝa, li flugigis kajtojn, kiujn li mem faris el papero. Alia inspiriginta infanaĝa momento okazis en la flughaveno en lia nederlanda urbo. Kiam li rigardis manikojn, li demandis sian patrinon pri iliaj funkcioj. Ŝi respondis, ke ili estas uzataj por montri la ventdirekton, kiu helpas organizi la direkton de la eniro kaj eliro de la aviadiloj.

During the early days of the group, Nanne proposed to the group musicians the name *Kajto*, which they later accepted. Ankie mentioned that kites are able to ascend and strive as if to see beyond borders and see other countries. She concluded, that the aims of Esperantists, although by different means, have similar aims to kites.

Have a look at the interview at
www.youtube.com/watch?v=NOmd69TNcjY&feature=related

and the concert at
www.youtube.com/watch?v=-SFhfq57obY★



Nanne kaj Ankie kantas ĉe Federacia Placo, Melburno.

Nanne and Ankie sing at Federation Square, Melbourne

Dum la komenco de la grupo, li proponis al la grupmuzikistoj la nomon *Kajto*, kiun ili poste akceptis. Ankie menciis, ke kajtoj povas altiĝi kaj strebas kvazaŭ superrigardi limojn kaj vidi aliajn landojn. Ŝi konkludis, ke la celoj de la esperantistoj, kvankam per malsimila maniero, similas al tiu celoj de kajtoj.

Vidu intervjuon de Kajto ĉe
www.youtube.com/watch?v=NOmd69TNcjY&feature=related

kaj koncerton ĉe
www.youtube.com/watch?v=-SFhfq57obY★



Tagmanĝo post la koncerto kaj aplaŭdo, sub la suno. Maldekstre al dekstre estas Ankie, Philip, Jenny, Marcel, Alida, Nanne, Pasa kaj Carol.

Lunch after the concert and applause, under the sun. Left to right are Ankie, Philip, Jenny, Marcel, Alida, Nanne, Pasa and Carol.

Monvarba Kampanjo por Esperanto-biblioteko en Afriko

de John Derks

La fondaĵo *Esperanto en Evoluo* lanĉis rimarkindan kampanjon por kolekti ok mil eŭrojn favore al konstruado de biblioteko en la setlejo *Rumonge*, Burundo, sur la lago Tanganjiko. Oni inventis metodon de valorcertigilo por helpi finance la junajn esperantistojn en Burundo. Tiu subskribita papero simbolas la pruntedonon de monsumo de minimume 50 eŭroj. La sumo restos dum minimume tri jaroj en la fonduso por konstruigi la bibliotekon. Post tiu periodo la pruntedoninto rajtas repostuli sian monon.

La nacia asocio de Burundo, *Association Nationale d'Espéranto au Burundi* (ANEB), estis tre aktiva kaj sukcesplena dum la lastaj jaroj. En aŭgusto 2008 ses instruistoj iris al foraj regionoj de la lando por unusemajna seminarieto, en kiu preskaŭ 100 personoj lernis Esperanton. En 2009 venis instrui Johan Derks kaj Svetlana Milanovic el Nederlando. En tiu jaro la nombro da kluboj kreskis al 37. En julio 2010 okazis la dua nacia kongreso; okazis en aŭgusto sukcesa seminario en la provinco *Bubanza* kun partopreno de esperantistoj el Ugando kaj Kenjo.

Lastjare la instrusekcio organizis kursojn kaj renkontiĝojn en diversaj regionoj de Burundo. La junulara sekcio estis akceptita de ILEI dum la krakova konferenco. Ankaŭ ekzistas sporta sekcio, kun piedpilka teamo, kiu partoprenas en loka turniro. Stariĝis ankaŭ skolta sekcio. En pasinta aprilo venis Mireille Grosjean el Svisujo. Ŝi instruis dum kvin tagoj kaj ekzamenis 14 partoprenantojn, el kiuj 12 sukcesis laŭ la meza nivelo kaj 17 laŭ la elementa nivelo kun 13 sukcesintoj.

En novembro 2010 ANEB aĉetis terenon de 425 kvadratmetroj kie ĝi konstruos la bibliotekon. Esperanta biblioteko estas esenca por la junaj esperantistoj, ĉar imagu ke se jam ili trovis monon aŭ afablan eŭropanon por ekhavi lernolibron, tiu estos baldaŭ ĉifonita pro eluzado tra multaj fingroj kaj pro manko de ŝrankoj en iliaj domoj. Kutime eĉ ne estas litkadroj en ilia domo, tiom malriĉaj ili estas. En la Esperanto-centro povos esti gardataj Esperanto-libroj kiel komuna posedaĵo, estos komputilo kun retaliro kaj la lokaj esperantistoj povos renkontiĝi.


VALORCERTIGILO DE 50/200/500 EŬROJ

PRO MONSUMO PRUNTITA DE

[Nomo]

al fondaĵo Esp. en Evoluo por financi la konstruadon de Esperanto-centro en Burundo

Esperanto vivos en Afriko danke al vi !

ricevita je ___ _____ 20__

_____

Nomo kaj funkcio de ricevinto

Post paso de du jaroj la pruntedoninto aŭ tiu plenrajtigito en tiu momento povas per skribita letero repostuli la sumon pruntitan per letero adresita al la sekretario de la fondaĵo (aktuale s-ro R. Cornetti). Ŝi rericeves la sumon ene de unu monato sur la bankokonto de ŝi-li indikita, prefere de UEA.

“Esperanto en Evoluo” havas propran retejon (http://esp-evoluo.tk) kaj konton ĉe UEA kun la kodo eeer-u. Simple ĝiru la deziratan sumon al unu el la kontoj de UEA (ekzemple 378964 ĉe ING-Bank, IBAN: NL72INGB0000378964, BIC: INGB NL2A) kun mencio de la kodo eeer-u, valorcertigilo kaj via adreso. La estraranoj de *Esperanto en Evoluo* esperas povi subskribi multajn valorcertigilojn en Kopenhago. ★

New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
nzea@esperanto.org.nz
0800 350 781

David Ryan | President
ryangomez@xtra.co.nz
Chris Krägeloh | Vice-President
esk2@esperanto.org.au
Donald Rogers | Treasurer
dc1971@clear.co.nz
Bradley McDonald | Secretary
bradley.m@whoosh.co.nz
Howard Gravatt | Assistant Secretary
hgravatt@ihug.co.nz
Erin McGifford | Committee Member
erin.mcgifford@press.co.nz

Vicky Crickett | Committee Member
vcrickett@gmail.com

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, answering queries from the public about Esperanto, and organising the annual *NZEA* conference.

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

Australian Esperanto Association

Esperanto House
143 Lawson Street
Redfern NSW 2016
Australia


www.esperanto.org.au
www.oceania-esperanto.weebly.com
info@esperanto.org.au
(+61 2) 9319 4775

Dianne Lukes | President
prezidanto@esperanto.org.au
Kam Lee | Administrative Director
admin@esperanto.org.au
Stephen Pitney | Financial Director
financoj@esperanto.org.au
vacant | Dir. of Member Services

Tim Stackpool | Dir. of Promotion
informado@esperanto.org.au
or *servoj@esperanto.org.au*
Jennifer Bishop | Director of Education
edukado@esperanto.org.au
Yaw Ampomah Badu | Dir. of Implementation
utiligado@esperanto.org.au

AEA was established for the promotion, education and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.



Dro L. L. Zamenhof
Varsovio, str. Dzika № 9.

5/IX 1911

Al la Aŭstralazia Kongreso Esperantista mi sendas miajn koran salutojn kaj deziras de plej bona sukceso. Mi esperas, ke la kongreso forte pusos antaŭen nian ideon en la malprogresinta sed progresema parto de la mondo.

L. Zamenhof

ENGLISH TRANSLATION.

Warsaw, 5/9/11.

To the Australasian Esperantists' Congress I send my hearty salutations, and wish for best success. I hope that the Congress will strongly forward our cause in the distant, but progressive part of the world.

L. L. ZAMENHOF.

Esperanto Aŭstralio ★ 100 JAROJ 1911 - 2011

Universitato de Adelajdo - Jubilea kongreso

9 - 17 julio 2011

aea2011kongreso.ning.com

subtenata de

THE UNIVERSITY of ADELAIDE